

Johann Wolfgang von Goethe, Gefunden	Johann Wolfgang von Goethe, Trovita <i>tradukita de Antoni Grabowski</i>	Johann Wolfgang von Goethe, Trovaĵo <i>tradukita de Ri- chard Schulz</i>	Johann Wolfgang von Goethe, Trovita <i>tradukita de Manfred Retzlaff</i>
Ich ging im Walde So für mich hin, Und nichts zu suchen, Das war mein Sinn.	Mi foje arbaron Promene eniris, Kaj serĉi nenion En penso deziris.	Mi vagis sola En la arbar'. Nenion serĉi Jen mia far'.	Mi tra arbaro Sencele iris Kaj trovi ion Mi ne deziris.
Im Schatten sah ich Ein Blümchen stehn, Wie Sterne leuchtend, Wie Äuglein schön.	Mi vidis, en ombro Jen staras floreto: Steletto lumanta Aŭ blu-okuleto.	Enombre vidis Floreton mi. Lumanta stelo, Okulvizi'.	Ĉe l' vojo vidis Mi etan floron, Kaj ege tuŝis Ĝi mian koron.
Ich wollt' es brechen, Da sagt' es fein: „Soll ich zum Welken Gebrochen sein?“	Mi volis ĝin ŝiri, Sed plore ĝi diras: “Ĉu por ke mi velku, Vi tial min ŝiras?”	Al mi plukonta Jen ĝia vort': „Ĉu ke mi velku Al frua mort' ?“	Kaj kiam volis Mi ĝin deŝiri, „N rompu min!“ , mi Ĝin aŭdis diri.
Ich grub's mit allen Den Würzlein aus, Zum Garten trug ich's, Am hübschen Haus.	Do mi ĝin elfosis Kun radikareto, Kaj portis al mia Ĝarden' ĉe l' dometo.	Mi ĝin elfosis Kun la radik' Ĝin portis domen Al la larik'.	Kaj mi singarde Ĝin elterigis, Al mia domo Ĝin translokigis.
Und pflanzt' es wieder Am stillen Ort; Nun zweigt es immer Und blüht so fort.	En loko trankvila Plantite karese, Ĝi kreskas, burĝonas, Kaj floras senĉese.	Replantis tie Ĝin en la fru'. Ĝi nun kreskadas Kaj floras plu.	Alialoke Ĝi nun kreskadas, La eta planto Kaj plu floras.
...

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22).*

Arg-376-738 (2006-12-11 22:11:49)

*Traduko de la Germana poemo "Gefunden" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de ANTONI GRABOWSKI (*1857-06-11 - †1921-07-04).*

Arg-376-741 (2006-12-14 00:07:48)

Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi traduk-version en la interreto, en la retejo de s-ano Don Harlow, en <http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/parnaso/>, precize sub <http://donh.best.vwh.net/Esperanto/iteraturo/Poezio/parnaso/trovita.html>.

*Traduko de la Germana poemo "Gefunden" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, *1906-07-12 - †1997-09-26) en 1984-07.*

Arg-376-740 (2013-02-26 15:17:50)

Tiu ĉi poem-esperantigo aperis en la n-ro 61 (1984/7) de la Vestfaliaj Flugfolioj“, kiujn eldonis Richard Schulz, kiu loĝis tiutempo en la germana urbo Mindeno (Minden). Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz.

*Traduko de la Germana poemo "Gefunden" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1982-05-05.*

MR-010-1 / Arg-376-739 (2006-12-11 22:15:22)